



CONCORDE

Organe Culturel

Direktoro :

Hubert FERÉZ

Abonprezo : 5F
Subtenabono : 10F

N I C A S T E L O

7, Avenue de Reims

NICE (Francujo)

C.C. Postal TOULOUSE 632.15

PROVENCE - ALPES - COTE D'AZUR - MONACO

24

1er TRIMESTRE 1970

TRIMESTRIEL

L'ENSEIGNEMENT DES LANGUES

La question de l'enseignement des langues qui provoque de plus en plus de remous et d'avis contradictoires, aboutit actuellement, dans les milieux enseignants à un désarroi, à un désordre lamentables. On a cru, ces derniers temps, calmer les esprits inquiets en déclarant dans la presse que 7.000 petits français de deux à six ans sont en train de devenir bilingues français-anglais ou français-allemand. !

A cela voici ce que répond M. Jules ALBAUT, Professeur dans un Lycée de Toulouse :

"Malgré tous les perfectionnements apportés dans les méthodes d'enseignement, le cerveau humain ne pourra pas maîtriser tant de langues à la fois et réserver la place des études professionnelles. On ne formera que des linguistes ayant un petit vernis scientifique et non de vrais techniciens, de vrais savants.

Non, la part linguistique doit être réduite au minimum pour laisser s'épanouir la part technique. Nous revenons donc au bilinguisme. Mais celui-ci pour être efficace dans tous les cas possibles devra être : langue maternelle + langue internationale. Celle-ci sera la même pour tous. Elle ne devra pas être une langue nationale pour ne pas avantager les uns au détriment de tous les autres. Elle devra être simple, logique, facile à acquérir et à prononcer par tous.

Cette langue existe, bien rodée par quatre-vingts ans de pratique : elle se présente avec ses 114 dictionnaires spécialisés dans les différentes branches de l'activité humaine, ses oeuvres, prose ou poésie, traduites ou originales, ses nombreux journaux et revues, ses émissions radiophoniques. C'est l'Espéranto parlé par 8 millions de personnes dans le monde et qui est prêt à donner à chacun une culture mondiale. Qu'il soit introduit en France à l'école primaire ou à l'école maternelle et immédiatement l'exemple serait suivi dans le monde entier. En quelques années, l'incompréhension entre étrangers n'existerait plus."

N'OUBLIEZ PAS, NE FORGESU ke la 62a Franca KONGRESO de ESPERANTO kaj la 2a RENKONTIGO Franca-Itala-Monaka Okazos de la 15a ĝis la 19a de Majo 1970 en MONTE-CARLO (Princlando Monaco).

(Se ne jam farite, plenigu tuj la ĉi-entenatan aliĝilon !)

Ne timeme, sed FIERE, portu surbruste la VERDAN STELON : bona efiko por propagando kaj ebla okazo por helpi al survoje trafitaĵ eksterlandanoj !

.../..

PRI RACIA UZO DE ESPERANTO
de la Sciencistoj aŭ de la teknikistoj

Nuntempe, tra la mondo, ni trovas kelkajn milionojn da sciencistaj aŭ teknikistaj artikoloj skribitaj en la originala lingvo de la aŭtoro. Multamaso da sciencistaj konoj aŭ informoj restas tiel nekonataj kaj ne uzeblaj de la teknikistoj alilandaj.

Sed traduki esperante tiun amason da informoj estas revaĵo kaj neebla, krome senvaloro. Car la scienco rapide progresas : informoj de sciencista artikolo, post kelkaj monatoj aŭ unu aŭ 2 jaroj estas jam sen valoro, kiam la esperanta traduko aperus. La kosto de la traduko atingus milionojn.

Sed facila perilo ekzistas por disvastigi la informojn de sciencista aŭ teknikista raporto aŭ artikolo eĉ skribita en originala lingvo de la aŭtoro.

Jen : Starigu grupon de tradukistoj kiuj sciis Esperanton kaj ankaŭ havus certajn konojn fakajn, en ĉiu lando kie ekzistas bonaj bibliotekoj. Tiel ekzemple : japana sciencisto bezonas legi artikolon en bulgara lingvo ; li ne devus havigi al si la originalon, sed nur sendi leteron al Bulgarujo (esperante) petante esperantan tradukon, kiu, se necese, povus esti tradukata en japana lingvo.

Kia bona propagando ! Kioma evito da tempo kaj de mono ! Tiel Esperanto penetros en sciencistan societon kaj pruvos sian utiligeblon kaj efikecon.

Junularo agadu por ke tiu projekto efektiviĝu en Francujo ! Tiel ni konvinkos la prirespondulojn de la Ministerio de la Edukado pri la utileco de Esperanto kaj la neceso instrui ĝin en la lernejoj.

Docteur PACEMO

KIO ESTAS M.I.E. ?

"Internacia Movado por Esperanto" (Mouvement international pro-Espéranto). Regita de la leĝo de la 1.7.1901, celante krei la ĉieĉeston de universala helplingvo tute neŭtrala, ebliganta, en ĉiuj landoj kaj ĉiumaniere, la vendon de varoj prezentitaj kun nia stelo kun teksto en ESPERANTO.

(Animanto : Jean JAYET, 3 rue Paul Pic -- 69. Bron (Komunikaĵo)

Se Sro JAYET daŭrigas tiun agadon, nedeflankiĝante, laŭ la ĉi supra celo, lin ni, kompreneble, plene subtenos.

MARCHE COMMUN

Les U.S.A. ne seraient jamais devenus ce qu'ils sont si chacun des Etats qui forment cette puissante Fédération avaient une monnaie et une langue différentes. Si nous voulons vraiment établir le Marché Commun Européen, il faut commencer par adopter une monnaie unique et ne pas obliger un Français par exemple, à traduire les documents, la publicité, en Allemand, italien, anglais, flamand, hollandais, etc.. L'espéranto pour tous, comme seconde langue, simplifierait les choses, aiderait grandement les Etats à se mieux comprendre et faciliterait le développement de leurs relations.

L. DROUET, NICE

62 a Franca KONGRESO de ESPERANTO

Kaj 2a RENKONTIGO Franca - Itala - Monaka -

COMITE D'HONNEUR - Monsiegnur Jean RUPP, Evêque de Monaco - S.E. Arthur CROVETTO
Ministre Plénipotentiaire de Monaco. - S.E. Jacques REYMOND,
Ministre, - M. Pierre MALVY, Conseiller de Gouvernement - M. Charles CAMPANA, du
Conseil National de Monaco - M. J.L. MEDECIN, du Conseil National - M. Georges GRINDA
Secrétaire Général du Conseil - Maître Robert BOISSON, Maire de Monaco - Maître
Paul MASSA, Sénateur, Maire de Beausoleil - M. Francis PALMERO, Maire de Menton,
Président du Conseil Général des Ales Maritimes - M. DERIGON, Maire de Vallauris
M. le Comte Guy de LESTRANGE, Consul de France à Monaco - M. René NOVELLO,
Directeur de l'Education Nationale de Monaco.

KONGRESA PROGRAMO

Kongresejo : Kongrespalaco de Monte-Carlo, avenue d'Ostende -
Vendredo, 15.5.1970 - 15h. : Malfermo de ĝiĉetoj, informoj, dokumentoj.
(3a etaĝo) - 19 à 21 h. : Interkona vespero en la trinkhalo (4a etaĝo)
Sabato, 16.5. - 9h. : Ekzamenoj : Skriba parto - II - 12h. SOLENA MALFERMO
de la KONGRESO (granda Konferencsalono (4a etaĝo)
13h.30-15h : Estrara kunveno (centra salono, 2a etaĝo) - 16 - 18 h.
Unua Generala Kunveno - 20h.30 - Distra vespero.
Dimanĉo 17.5.70 - 8h.30 : Kunveno de la responduloj de la FEDERACIOJ kaj de la
grupoj, en la centra salono (2a etaĝo) - 10h. 10h.15
Kunveno de la nova konsilio -
10h.15-12h. 2a GENERALA KUNVENO -
14h.30 - 16h.30 : Vizito de la Oceanografa Muzeo.
Vizito de la ĝardeno St Martin. Manifestacio, kun depono
de florbukedo ĉe la monumento, honore al S.P.M. Alberto
la Unua - 18 h. - DISERVO en Esperanto de Monsinjoro
Jean RUPP. Episkopo de Monako - 20 h. BANKEDO en la
Restoracio "LA CHAUMIERE" ĉe Ekzotika Ĝardeno, autobus 2
Lundo 18.5.70 - 8h.30 : Estrara kunveno - 9-10h : Kunveno de UEA delegitoj -
EKZAMENOJ : parola parto - 11-12h. Vizito de l'
Prahistoria Antropologia Muzeo kaj de la Ekzotika
ĝardeno, (autobuso 2) - AKCEPTO fare de la Urbestro,
en tiu ĝardeno - 14h. Ekskurso al Vallauris - Vizito
de la urbodomo, partedekoraciita de Picasso -
21h. Vizito de la Kazino -
Mardo 19.5.70 - 8 h. Tuttaga ekskurso al Tende. Manifestacio ĉe la tomo
de la fama skota sciencisto--botanisto Clarence BICKNELL

KELKAJ DETALAJ INFORMOJ - S.P.M. ALBERTO la Unua : tiu Monaka Princo estis Ano
de la Scienca Akademio Franca kaj fondis la Oceanografian Muzeon. Kun aliaj
Akademianoj li subskribis Rezolucion favora al ESPERANTO.

EKSKURSO al VALLAURIS - Urbeto tre konata pro ceramikarto, kies Urbestro Sro
DERIGON estas fervora Esperantisto parolante flue la lingvon

EKSKURSO AL TENDE - Urbeto ĉe la itala landlimo. Autobusoj forveturos je la 8h.
matene de la placo de la antaŭa stacidomo de Monte-Carlo. En Tende, situanta en
belega regiono, la Urbestro akceptos nin. Tie ni manifestos ĉe la tomo de
Clarence BICKNELL, fama botanisto, kiu pristudis la mediteranean flaŭron. Li
estis tre aktiva esperantisto dum la unua periodo de nia movado, kaj multe
laboris por mia Idealo . (Sekvo p.4)

VIZITO de la MONDFAMA KAZINO - Se vi suferas pro tro da mono, oni tie helpas vin, sed se vi suferas pro malmulte da mono, vi bezonos diablan ŝancon por resaniĝi !

La KAZINO estas mem tuta mondo : enkorpigita en la konstruaĵo troviĝas la OPEREJO, konstruita de la fama arkitekto Charles GARNIER (kiu ankaŭ konstruis la OPEREJON de Parizo). Tiu Operejo estas unu el la plej belaj de Eŭropo. Gi ankaŭ estas unu el la plej grandaj internaciaj lirikaj scenejoj.

LA OCEANOGRAFIA MUZEO - Inaŭgurita en 1910 fare de Princo ALBERTO la la, kiu estas ties fondinto kaj kiu kolektadis en ĝi ĉiujn interesaĵojnprisiaj krosadoj. La konstruaĵo superstaras apike la maron je 80 metroj.

SERVO - La ĝustatempe enskribitaj Kongresanoj ricevos de la kongresservo "RESTADBROSURON", kiu estas persona kaj valora dum la kongrestagoj kaj kiu permesas RABATON de prezoj - enirprezoj de muzeoj, de kazino, de naĝejoj kaj ankaŭ rabaton en pluraj vendejoj.

L'Espéranto au service de la Science -

OEUVRE MERITOIRE et d'une UTILITE TRIS PRATIQUE

Robert GERARD, Professeur de Géographie (45, rue de Vouillé, Paris 5°), avec comme assistant Raymond LAVAL, de Nîmes, vient de créer un "Bulletin de résumés scientifiques d'origine espérantiste à l'usage des nons espérantistes". Donc : transmission bénévole de documentation grâce à l'Espéranto.

Toute étude de valeur paraissant dans un pays quelconque est traduite en Espéranto par un espérantiste compétent de ce pays, puis envoyée à l'organisme de la rue de Vouillé, qui la traduit en français.

Grâce à ce service, professeurs et étudiants français peuvent être tenus au courant des nouveautés scientifiques de tous pays sans qu'ils aient à connaître la langue de ce pays.

Preuve irréfutable de la nécessité de l'Espéranto pour l'avancement des sciences.

LA VIE des GROUPES

GAP - Post longaj klopodoj ni sukcesis malfermi du kursojn. En decembro ĉar 4 studentinoj en la knabina liceo, gvidata de Sro Colney ; la kurso progresas kontentige. En januaro en la knabaliceo por 3 studentoj instruataj de Sro Got, profesoro en tiu liceo. Okaze de la februara kunveno, la grupestraro elektis la jenan programon por la 1970 printempo.

Ebla-kaj tute libervola partopreno al la kongresoj de Tulono, Liono, kaj Monako. La 3an de Majo eventuala renkontiĝo en La Chapelle en Vercors kun grupanoj el Romans kaj Liono - La dimanĉon 7 an de Junio, rekontiĝo en Serres, RN n° 94, direkto al Gap, kvartalo "Les Chambons", 800 metroj de la urbeto. La Grupo invitas al ĉiu renkontiĝo ĉiujn samideanoj el la regiono note el Hautes-Alpes, Isère, Drôme, Vaucluse, Bouches-du-Rhône kaj Var. Mangô tirita el sakoj aŭ kontraŭ antaŭa enskribiĝo 10 tagoj antaŭe kaj ĝiro de 5 frankoj po persono al "Groupe espérantiste de Gap" CCP Marseille 3069 -37. Berres estas facile atingebla ĉu per aŭtomobilo, ĉu per trajno. Foriro el Marsejlo 7h.58 al Valenco

7h.45, el Liono 6h.48, el Grenoble 8h.41, el Gapo 7h.31 à 9h.50.

Programo : Komuna manĝo, posttagmeze : diversaj ludoj, banado à fiŝkaptado en rivero Buech.

Agado ĉe la postistoj : La oficiala gazeto de PTT administracio enpresigis en siaj kolonoj la sciigon de perkoresponda kurso por poŝtistoj. Sekve de tiu alvoko, preskaŭ tridek poŝtistoj petis informojn kaj 20 enskribiĝis al la perkoresponda kurso gvidata de Sro Colney peranto por Francio de la Internacia poŝtista Esperanto Asocio, kies sidejo estas en Sofio. Ni alvokas la poŝtistojn por ke ili aliĝu la Asocion kies bulteno "Interligilo" aperas ĉiun duan monaton. (La jarkotizo fiksita je 10 internaciaj ordinaraj leterafrankoj (7 Fr. por 1970) estas pagebla al Sro Colney PTT, 05. GAP, CCP LYON 1086 95, antaŭ la 20.3.70.

CARPENTRAS - La movado daŭras danki al la fervora impulso de Sino Bonafous, Profesoro kaj de Sro Revest, tenaca animanto. Kunveno de la grupo, la duan ĵaŭdon de ĉiu monato ĉe hejmo de Sino Bonnafous, okazo de legado de leteroj ricevitaj de la membroj el ĉiu parto de l'mondo.

MONTE-CARLO - La 4an de januaro, festo de l' "Tri Reĝoj", en hôtél Splendid, kun franda bankedo sekviita de projekcio de tre interesaj diapozitivoj pri vojaĝo de Sino de Monty en Indio.

NICE - 14.12.1969 - Generala kunveno de l'Grupo. Estis reelektitaj por 3 jaroj Hub. FERREZ, Prezidanto - Fino M.L. COMINO, Vic-Prezidantino, Sino COLEAU. Ceteraj anoj de l'komitato estas : Sro R. FIQUET, Président d'Honneur, Sro CHAUCHEAU, Vic-Prezidanto - Sino SEPTEMBRE-PAUCOT, Sekretariino - Sro N.PAZZINI, Kasisto - Fino GAUDEMARD - Sro P. CAVELAN - Sro R. FROELICH, Delegito por Informado. Propono de Sro SANGALLI estis diskutita.

Sekve de tiu kunveno okazis sukceplena kaj gaja bankedo, kiun ĉeestis 72 gegastoj.

10.1.70 - A l'occasion de la Conférence mensuelle du Groupe Andromède d'astronomes amateurs de Nice, Sro René FROELICH, Membre du Comité linguistique et culturel régional "Concorde", prenant la parole devant la nombreuse assistance (environ 80 personnes) très attentive, a mis en relief la haute valeur de l'Espéranto non seulement pour les astronomes qui, grâce à cette langue, peuvent par dessus les frontières, échanger opinions et observations très utiles, mais aussi pour l'enrichissement de la culture, en général. Le Président du groupe "Andromède" a chaleureusement appuyé la thèse de M. Froehlich dont il a souligné toute l'importance et vivement remercié l'orateur

25.1.70 - Festo de la "Tri reĝoj" en salono de Hôtél de Noailles. Brila kunveno kun 52 partoprenantoj. Kantoj de Sino Cavelan kaj de Sino Klein tre varme aplauditaj. Pastoro Liepelt, per siaj spritplenaj ŝercaĵoj, Fino Espitalier, per deklamo de siaj de ŝi verkitaĵoj belaj poemoj, sino Luquet, Sro Lamaccia, per siaj kortuŝaj italaj kantoj, Sro Mallet, per artaj kanto kaj deklamo ankaŭ kontribuis al kreo de vere festeca etoso.

Ni ŝuldas egan dankon al la georganizintoj de tiu kunveno t.e. al Fino M.L. Comino kaj Sro Pazzini, al Fino Line Profizi rimarkinda pro ŝia feina organizkapablo kaj ŝia alta idealismo, same kiel al la geestroj de la hotelo gesinjoroj Profizi, kiuj senavare metis grandan salonon je nia dispo.

SOLLIES-PONT - Kiel ĉiujare, nia elstare sindonema samideano Sro Mathis organizis por la "Amicale des Parents d'élèves des Cours d'Espéranto du Canton de Solliès-Pont" grandan feston, kiu okazis la 25 an de januaro kaj kiun ni povas vere nomi apoteozo de la grandioza kultura agado de nia amiko Mathis. Inter la 300 ĉestintoj, ni citu : Senatano Balestra, Urbestro de Solliès-Toucas, Sro Mistral, Urbestro de La Farlède, Sro Rimbaud, urbestro de Solliès-Pont, Sro Garrigue, Président des Centres culturels d'Espéranto, Sro Marcel Jullien, Vice-przidanto. La ĉesto de Fino Kimie Ozawa, japanino el Tokio, kies parola-don (en Esperanto) tradukis en francan lingvon Sro Garrigue, kaŭzis grandan sensacion.

Fine, Fino Joëlle Pieri, juna lernantino, sed "dojerenino" pro ŝia fideleco, deklamis la poemon de l'"Hymne à la Paix", himno de la Regiona komitato "CONCORDE" Bela tago, denovasukceso de la "Amicale" !

(laŭ la Tulona ĵurnalo "République")

TOULON - Federacia Prezidanto Garrigue sciigas : La Tulona Grupo Zorgas pri la organizo de la 36a Regiona Kongreso - tre probable la 12 an de aprilo. Ni jam tutkore invitas Vin ĝin partopreni kiel eble plej multaj. Krom la matena laborkunveno, ni havos la plezuron esti akceptitaj de la urbestro, kunmanĝi en agrabla restoracio kaj viziti la najbaran insulon "Les Embiez".

ASPREMONT - Ni, kun ĝojo, sciigis pri elekto de Tereza YELLAND kiel Granda Oficiro kaj de Ernest Edward YELLAND (nia karmemora altvalora Samideano) kiel Kavaliro de Granda Kruco de la Universala Ordeno de Antares. La Nica Esperantistaro, dum sia sia festo de la 25.1.70, ĝogis honoris ambaŭ niajn ĝeamikojn kaj la Prezidanto Hub. Férez legis al la ĉeestantaro la tekston de la du diplomoj. Al tiu omaĝo ni aldonas la varmajn gratulojn de "CONCORDE". (Pli granda amplekso de detaloj aperos en la venonta n° de "CONCORDE")

CANNES - L'évènement capital : un Stand d'Espéranto au IIe Salon Commercial de Cannes. La présence quotidienne de Melle Kimie Ozawa Espérantiste japonnaise qui fait actuellement le Tour du monde en n'utilisant que l'Espéranto, (la seule langue qu'elle parle en dehors du japonais) fut, pour le grand public la preuve vivante et éloquente de la haute valeur pratique de l'Espéranto. Félicitations à M. Lanzo pour l'installation de ce stand.

GENERALAJ INFORMOJ

Pour la lère fois en France ! - Introduction de l'Espéranto dans les cours officiels de la Faculté des Lettres de Clermont-Ferrand, la première (et pour l'instant l'unique) à assurer en France cet enseignement.

Centre de télé-enseignement de Clermont-Ferrand - A la catégorie des auditeurs adultes, il est proposé des émissions d'initiation au russe, à l'italien, à l'espagnol, à l'espéranto et au latin. S'adresser au Centre de télé enseignement, Faculté des Lettres, Université, 22 Bd Gergovia à Clermont-Ferrand.
5 modulation de fréquence - Emetteur "Clermont-Auvergne, réseau France-Inter 90,4 MHz (chaque vendredi de 13h.30 à 14h.)

Paska kultura Semajno 1970 en Grésillon --(de la 22a de marto ĝis la 4a de aprilo).

1-a Semajno (22-29 de marto) : Studo de tekstoj - Pedagogia inicado al instruado de Esperanto - Kultura kaj arta aplikado de la lingvo. Seminario por respondeculoj pri informado - Ekskurso la 25-an.

2-a Semajno (29 marto- 4 aprilo) : Aplikado de la lingvo - Diversaj distraĵoj. ADRESO : Esperantista Kulturdomo - Kastelo Grésillon - 49 6 BAUGE (Francio).

La Bibliothèque municipale de Mulhouse ouverte au progrès ! Signalons à nos lecteurs que la bibliothèque municipale de Mulhouse -(68) est dotée d'une importante collection d'ouvrages dialectiques et littéraires en langue internationale Espéranto. Ces ouvrages se trouvent à la disposition du public au rez de chaussée de la bibliothèque (section 408) et à la section d'études (1er étage).

Alice RIHN

FELIETONO

La Malaka Kano (Rakonto de E. YELLAND) (daŭrigo)

La domo de miaj gepatroj estis en la antaŭurbo de Plymouth. Ĉe la fronto de nia domo estis malgranda bedo por floroj kiel ĉe aliaj domoj en nia strato. Venis tago kiam unu el niaj kamaradoj, samaĝa kiel mi, konfide diris al mi : "mi volas plibeligi nian bedon por ke ĝi estu pli bela ol la via", kaj li aldonis : "en la bedo de la vilao "Myosotis" esta belegaj floroj. Hodiaŭ vespere revenante de la lernejo, estos facile al ni trairi la pordegon kaj preni kelke da plantoj en floro." Post la lernejo ni haltis ĉe la aĵure forĝita pordego kaj vidis belajn florojn, nur dekdu metrojn de ni. "Rigardu !" diris Vilĉjo, "la floroj ja estas belaj kaj estas facile preni ilin ; ĉirkaŭ neniuj estas videblaj. Venu, kuru rapide !". Kaj sen plua vorto li per puŝo malfermis la pordegon kaj ni al kuris al la bedo. Kun fulma rapideco ni eliris al la tero kelke da plantoj, kaŝis ilin sub niajn vestojn kaj rapide forkuris kun nia prenaĵo.

Kiam ni jam estis preskaŭ cent metrojn for de la vilao kaj opiniis, ke ĉia risko esti kaptata jam forpasis, subite, viro alsaltis kaj kaptis min. Estis la ĝardenisto, kiu iamaniere vidis nin. "Ha", diris li, "estas vi, kiu ŝtelas la florplantojn en la florbedo. Vian nomon ? Vian adreson ? Mi bone konas vian patron kaj hodiaŭ vespere mi venos paroli al viaj gepatroj". Li lasis min libera. (sekvo en la venonta n°.)

RECENZO - KRISHNAMURTI - de Lydia BERCOU - ĵus aperis tiu verko, kiu estas harmonica aro de pluraj prelegoj pri Krishnamurti, kiujn faris la aŭtorino en Francio, Svisio, Belgio, Hispanio, Portugalio, Israelo, Usono kaj precipe en Châtelguyon -(63) dum la somera sezono. Bonega priskribo de la animo, de la vivo kaj de la verko de Krishnamurti. Libro leginda de seriozaj personoj, kiuj emas kliniĝi al homaj mizeroj serĉi rimedjn de kvietigo. Libro verkita en franca lingvo. Prezo de tiu verko : 14.50 F mendebla al la aŭtorino : Sino L. Bercou, 15, rue de la Poste, 63 CHATELGUYON. (animo de la Esperanto- Grupo de NICE).

ELEMENTS DE GEOLOGIE en 6 langues (dont l'espéranto) - Société d'Edition d'Enseignement Supérieur, 5 Place de la Sorbonne - PARIS (5°) - Auteurs : Allemand - Aline Ehrlich, Faculté des Sciences de Paris - Anglais : J.P. MICHEL, Faculté des Sciences de Paris - Espagnol : Martin MORENO DE LA HUERTA, Ingénieur à Madrid - Espéranto : Robert GERARD, Professeur Honoraire de l'Université, Paris - Français : André CAILLEUX, Professeur à la Sorbonne - Russe : A. GORODISKI, Géologue - Ingénieur. Cet ouvrage est suivi d'un glossaire comparatif des langues employées et d'un excellent précis (epitomo) de la grammaire espérantiste.

Nos très vives félicitations à notre Ami le Professeur Robert GERARD, réalisateur de cette oeuvre.

EROS - de Samideano Domenico PASTORELLO - Kolekto de originalaj poezioj, en itala lingvo, kiun la titolo de l'libro sufiĉe konjektigas. Rimarkinde harmoniaj versoj. Profunda sincereco stampas tiun verkon.

El la sama poeto : "OMERTA" e "MAFIA", in itala lingvo.

LA KAOSO (70 p) - de Domenico Pastorello, en Esperanto sendata senpage de la aŭtoro (13. Fos sur mer).

ANEKDOTO

Respondo de knabino

Afable sinjorino demandas al Henrika, kiom da personoj estas en ŝia familio. "Kvar", respondas la infano, "patrino, patro, fratino kaj parenco malproksima" - "Tio estas nur tri. La malproksima parenco ne estas membro de la familio". - "Ho, jes, li estas. Estas mia frato." - "Via frato ! Tiam li ne estas malproksima parenco ! " - Jes, sinjorino, li estas : li estas en Ameriko."

AVIZO

La abundeco da oficialaj informoj devigas nin prokrasti ĝis la venonta N° . La publikigon de bela poemo "Nereda Vojaĝo" de nia amiko L. VANNINI kaj la rubrikon de nia kunlaboranto N. PAZZINI.

COURS D'ESPERANTO par CORRESPONDANCE

- 1.- Etude complète de la langue en 22 leçons
- 2.- Aucun livre à acheter : le matériel d'étude est fourni
- 3.- Réception gratuite du bulletin culturel "CONCORDE"
- 4.- Inscription gratuite comme membre de la Fédération de Provence
- 5.- Invitation personnelle à nos fêtes, rencontres, congrès, etc...
- 6.- Attribution gratuite de correspondants (es) à l'étranger.
- 7.- Attribution d'un diplôme de fins d'études.
- 8.- Enseignement et correction des devoirs gratuits. Seuls frais : Contribution unique de 20 F. (Frais d'impression des cours, édition du Bulletin, Invitations personnelles, propagande etc..) à verser au Président : M.H. F E R E Z - NICE - C.C.P. 632.15 - TOULOUSE -

IMPRIMERIE : CENTRAL-COPIES
8 descente Crotti
NICE - Tél.85.92.52